


DUMONATA REVUO / TWEEMAANDELIJKS TIJDSCHRIFT

# Sonorilo

66-A JARO, N-RO 4

JULIO-AUGUSTO 1974

BELGA ESPERANTO-FEDERACIO



# Sonorilo

Oficiala organo de Belga Esperanto-Federacio, St.-Bernardsesteenweg 1078, 2710 Hoboken.  
Poŝtĉekkonto de BEF: 000-0163434-86 de BEF, Oude Donkiaan 83, 2100 Deurne.

Prezidanto: D-ro Pol Denoël, Rue Victor Raskin 20, 4000 Liège.

Redakcio: Drakenhoflaan 97, 2100 Deurne.  
Ĉefredaktoro: Fernand Roose.  
Redakcia sekretario: Paul Peeraerts.

Kontribuoj por „Sonorilo” estu ĉe la redakcio la 1-an de ĉiu malpara monato (januaro, marto ktp.).

## KOTIZOJ DE BEF

Kadeta membro (ĝis inkl. 16-jara):	45 fr.
Junula membro (17 - 25-jara)	: 75 fr.
Simpla membro	: 200 fr.
Familia membro	: 75 fr.
Bonfaranta membro	: 300 fr. minimume.

La kotizoj estu pagitaj al loka grupo (kies adresoj estas troveblaj en „Esperanto-Panorama” kaj en „L'Esperanto en Marche”) kaj ne al la Federacia Kasisto.

*La tre atenta leganto (kaj kiu membro de BEF ne apartenas al ĉi tiu kategorio ?) estos tuj rimarkinta ke tiu ĉi nuna numero de „Sonorilo” aspektas iom malsame kiel la ĝisnunaj. La litertipoj ŝanĝiĝis (dank'al la kunlaboro de la Antverpena grupo „La Verda Stelo”) kaj la enhavo iom adaptiĝis. Ĉu tiuj ĉi ŝanĝiĝoj estas aprezataj de niaj legantoj, ni tre volonte ŝatus ekscii. Prenu do la klasikan „flavan karton” (ĝi eĉ en nia inflaciema tempo kostas nur 4 fr.) kaj bonvole sciigu al ni viajn opinion, dezirojn, komentojn laŭdajn aŭ mallaŭdajn kotopo. La adreson de la redakcio vi trovos supre sur tiu ĉi paĝo. Koran dankon!*

LA KOVRILA FOTO: Jam sufiĉe konata mildo de niaj Universalaj Kongresoj. Jen memoraĵo pri la historia hamburga kunveno. Pri tio vi legos aliloke en tiu ĉi numero.

## ĉefartikolo

NENIAM NACIA LINGVO POVOS FARIĜI  
LA UNIVERSALA LINGVO

Jena titolo estas en kontraŭdiro kun la konvinko de tre multaj personoj, ke la angla jam estas la internacia lingvo. Ŝajne estas tiel. Ni vidu kelkajn faktojn. Je la 25-a jarfestoj de NATO, Luns parolis publike kaj oficiale ... en la angla. Kiam oni aŭdas deklarojn de ministroj aŭ ŝtatestroj ĉu de Irano, ĉu de Israelo, de kie ajn, ili parolas preskaŭ ĉiam en la angla. Preskaŭ ĉie en la mondo oni instruas la anglan, kaj en multaj lernejoj de ĉiuj kontinentoj ĝi estas la dualingvo. Evidente la angla iĝus la universala lingvo, se ekzemple la potencaj ŝtatoj interakordiĝus pri tio en la sino de la internaciaj institutoj kiel UNO. Sed sur tiu kampo eĉ ne la plej malgrandan progreson oni konstatas. Tute kontraŭe ! La potencaj ŝtatoj klopodas per ĉiuj rimedoj lokigi sian lingvon en la vicon de la oficialaj kaj laborlingvoj. Tiel ekzemple la rusa intelektulo Kostomarov povas paroli pri la „klubo de la mondlingvoj”. Al tiu klubo apartenas (kompreneble, kaj per multaj argumentoj) ankaŭ la rusa. Tiel ke en tiuj internaciaj institutoj ni konstatas konstantan kreskon de la nombro de oficialaj lingvoj kaj laborlingvoj, malgraŭ la terure leviĝantaj kostoj kiujn tio alportas. Kial do tiuj samaj ŝtatoj, kiuj ne volas adopti la anglan kiel solan universala-

lan lingvon — ĉar nur en tio kuŝas la solvo de la lingva problemoj, ne en la akcepto de arodatiaj lingvoj — tamen instruigas ĝin en siaj lernejoj? Tutsimple ĉar tio estas en ilia intereso! Nur tio tre gravas: la intereso. Iliaj sciencistoj, komercistoj k.a. devas tamen esti kapablaj uzi ĝin. Estas ja fakto ke la angla estas la plej disvastiĝinta. Do ili devas esti kapablaj legi la sciencajn verkojn en la angla; propagandi per la angla siajn industrion, komercon, turismon k.a. Cetere tiuj ŝtatoj instruigas ne nur la anglan, sed ankaŭ la francan. Kompreneble plej multe la anglan, ĉar, mi ripetas, tiu estas la plej grava. Intertempe tiuj potencoj strebas al disvastigo de sia lingvo. Interesa en tiu rilato estas la tezo de Prof. D-ro Frank, membro de Germana Liberal-Demokrata Partio: la tasko de la germana politiko sur lingvo-kultura kampo estas la protektado kaj sekurigo de la pozicio de la germana lingvo tra la mondo. Tie ĉi mi memorigu ke antaŭ unu jaro mi estis en debato en la Europa domo en Gent, kun Prof. D-ro Paardekooper kaj, ke tiu sciigis al la ĉeestantoj, ke de post iom da tempo kreskas la nombro de germanaj sciencaj verkoj kiuj estas verkita en la germana lingvo. Tiu fenomeno estas en tuta konsekvenco kun la tezo de Prof. Frank. Mi devas ankaŭ

aldoni ke tiu lasta estas tiel objektiva rekoni ke ankau aliaj lingvoj havas la saman rajton; kaj ke estas neeble lerni ĉiujn; ke sekve oni devas pri-konsideri la enkondukon de plan lingvo. Kaj li mencias Esperanton (legu "Esperanto" feb. '74; p. 27). En la sama optiko estas interesplene ke la reprezentantoj de la grandaj potencoj preskau neniam uzas la anglan. Estas la reprezentantoj de malpli gravaj au malpli potencaj ŝtatoj kiel uzas ĉu la anglan, ĉu al francan, ĉu alian grandan lingvon.

Alia signifoplena evento estis la konferenco de la arabaj oleoproduktantaj landoj kiu okazis en Kuvajto la 7-10-17. Post la konferenco estis publikigita komuniko nur en la araba. Kaj kiam fama ĵurnalisto de "eĉ pli fama ĵurnalo" petis la anglalingvan komunikon, oni sciigis al li ke tio ne ekzistas kaj ke li mem devos zorgi pri traduko en la anglan se li volas havi ĝin.

Mi volas mencii lastan fakton en tiu kontrauangleco kaj kontraufranceco. Oni scias ke la plej granda parto de la ĵus memstaraj afrikaj ŝtatoj havas registarojn, kiuj uzas nur la anglan au la francan lingvon. Tiuj estas la oficialaj lingvoj en tiuj ŝtatoj. Sed ankau tiu situacio povas ŝanĝiĝi; kaj tre verŝajne ŝanĝiĝos. La Unuiĝo de Afrikaj studentoj en Eŭropo (UASE) publikigis deklaron pri la lingva problemo en Afriko. Ili emfazas en tiu deklaro, ke la lingvoj de tiuj ŝtatinstancoj estas konataj nur de eteta minoritato de la lando. Plie

ke tiuj ŝtatestroj estas fakte fremduloj en la propra socio, kaj ke sub tiaj kondiĉoj la angla au franca protektismo fakte dauras en kamuflita formo. Fine, ke kompleta malkolonigo implicas la remalkovron de la Afrikaneco kontraste al franceco au angleco. Ĉu vi audas tie la komencon de revolucia tono? Ankau tiuj ŝtatoj kaj popoloj trapasos sian nacionalistan stadion, en kiu ili volos respektigi proprajn lingvon kaj kulturon, sen kia ajn diskriminacio.

Ĉiuj tiuj fenomenoj kaj manifestacioj montras ke la superregado de la angla estas nur portempa, kaj ke ĝi ne iĝos, eĉ ne por mallonga tempo, la universala lingvo. Diskonigu tiujn faktojn. Estos malfacile ankoraŭ konvinki la amason. Tamen ili pensigos tiujn, kiuj volas pensi. Estas verŝajne tial, ke pli kaj pli da gvidantaj personecoj (ne el la politika mondo) ekhavas interesiĝon pri la mondlingva problemo, kaj ne plu tiel apriorie forĵetas Esperanton. Kaj intertempe ni paciencie daurigu nian agadon, nian propran Esperantan vivon; nian kulton de la lingvo Esperanto. Post la fiasko de la naciaj lingvoj, (por solvo de la internaciaj rilatoj) venos la ŝanco de Esperanto. Ω

Fernand Roose

ΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔ

Ĉoĵi  
pri la feliĉo de la aliaj  
estas la vera vojo  
al la propra feliĉo.

(Georges Bernanos)

## movado

HAMBURGO : LA EKSTERORDINARA

La ĵus okazinta 59-a Universala Kongreso de Esperanto en Hamburgo estis certe el ĉiuj vidpunktoj eksterordinara aranĝo. Ĝi en la historio de Esperanto kaj de UEA estos ankoraŭ tre ofte preparolata. Jen koncize la plej gravaj aferoj, kiuj zorgis pri tiu ĉi eksterordinareco:

La konferencejo de tiu ĉi 59-a U.K. estis la plej luksa, la plej bela, la plej taŭga ejo, kiun LMK iam sukcesis lui por tia ĉi celo. Ĉiuj salonoj estis adekvataj kaj kreis iun plaĉosenton kiu komplete forgesigis la eksteran autunan veteraĉon (nur dum la adiaŭa tago gastis nin la suno, espreble simbolo kaj bona auguro por la tiutage instalita nova estraro!).

Dua fakto kiu eniros la historion estas la foriĝo de la estraro Lapenna. Prof. Ivo Lapenna efektive decidis post 25-jara gvida posteno retiriĝi el ĉiuj funkcioj kaj membrecoj de la Esperanto-movado. Pluraj el liaj kunkomitatoj prenis la saman decidon, inter aliaj Prof. Régulo-Perez kaj sinjoro Sonnabend.

La komitato de UEA sekve decidis pri la jena nova estraro:

Prezidanto:

D-ro Humphrey Tonkin

Vicprezidantoj:

S-ro Werner Borman

Prof. Carl Stöp-Bowitz

Sekretario:

S-ro E.L.M. Wensing

Estraranoj:

D-ro Pol Denoël

D-ino Flora Szabo-Felső

S-ro Marian Svistak

S-ro Evert Woessink

La tasko de tiu ĉi nova estraro neniel estos facila. Ilia unua kaj plej urĝa klopodo devos esti la sanigado de la financoj. La antaŭa estraro postlasis deficiton de proksimume unu miliono da belgaj frankoj. La novaj gvidantoj devos unue bari ĉiajn troajn elspezojn, kaj aliflanke serĉi freŝajn monrimedojn. La auguroj por la ĵus elektitaj gvidantoj do ne estas brilaj kaj la membroj atendu sobran jaron kaj sobrajn aranĝojn.

La plej sukcesinta programero de la Hamburga kunveno laŭ pluraj estis la teatra vespero dum kiu la Bulgara Esperanto-Teatro ludis la amuzan verkon de P.A.C. de Beaumarchais „La Barbiro de Seviljo“. Tiun ĉi spritan verkaĵon majstre prezentis aktoroj unuarangaj el Sofio sub la gvidado de Kiril Drajev.

Same altkvalita estis sendube la internacia artvespero. Dum ĝi bedaŭrinde konstateblis, ke la meza kongresano ŝajne pli ŝatas mezkvalitajn kanzonojn pri „nia bela ideal“ kaj pri „la fiera verda stel“ ol monda kulturo.

Lau niaj enketitoj, sub la nivelo estis la filmprezentado ("Angoroj" de J. L. Mahé) kaj la oratora konkurso kiu ŝajnis esti la „lautlega konkurso“.

Ĉiuj aliaj kongresaj aranĝoj ŝajne ne estis elstaraj, nek en pozitiva, nek en negativa direkto. Menciendas la internacia balo, kiu, parte pro la bela ejo, parte pro „Kvarteto Esperanto“ vere sukcesis. Ne tiom entuziasma oni estis pri la nun jam tradicia eukumena diservo. Multaj katolikoj eĉ ĝin konsideris ofendiga por si kaj siaj samkredanoj. Krome... la fakto, ke ĉeestis apenaŭ 10 (dek!) gejunuloj, devus ankau esti pripensata de la organizantoj.

Fina fakto, kiu, kvankam netute rilatanta la kongreson mem, karakterizis la atmosferon estis la terure altaj hamburgaj prezoj. Tarifoj pli-malpli 30 elcentoj pli altaj ol ĉe ni en Belgio ofte kondukis la ĉeestantojn al apudaj budetoj, kie, kontraŭ pli modestaj konsumoj, haveblis kolbasoj kun ajlo...

Sume : kongreso alia ol la aliaj. Ω

Paul Peeraerts

△△△△△△△△△△△△△△△△△△△△△△△△△△△△△△

NOVA GRAVA KONKURSO DE POLA RADIO

- 10-taga ekskurso tra Pollando
- multaj valoraj objektaj premioj

fariĝos gajnitajo de eksterlandaj auskultantoj de la Pola Radio, kiuj respondos al niaj demandoj:

1. Kiun en la disaudigoj de la Pola Radio vi auskultas plej ofte kaj kial ?

2. Kiajn rimarkojn vi havas rilate niajn antenajn programerojn en Esperanto ?

Respondo al unu el la supraj demandoj jam rajtigas al partoreno en la lotado de la premioj.

La respondojn ni petas sendi al la adreso Polskie Radio, 00950 Warszawa, Skr. Pocz. 46, Pollando, en kovertoj signitaj de la vorto "Konkurso", ĝis la 30 de Oktobro 1974. Decidas dato de la poŝta stampo.

La rezultojn ni anoncos en Ĉiuj Esperanto-disaudigoj la 25 de Novembro 1974.

La ekskurso de la laureato de la ĉefa premio okazos en periodo indikota de la Pola Radio.

Ni memorigas al niaj legantoj ke Radio Varsovio nun tre facile estas audebla vespere je la 22-a h. 30 en la meza ondo-longo, 200 m. Kaptu la okazon!

**HONORIGO**

*Okaze de la elekto de nia prezidanto, D-ro Pol Denoël, kiel estrarano de Universala Esperanto-Asocio, la redakcio de "Sonorilo" esprimas sian tuthoran gratulon kaj deziras al li vere fruktodonan laboron en tasko tiel apudhara al li.*

**mozaiko**

Ni estas grupo de polaj esperantistoj 17-jaraĵaj kaj dezirus korespondi kun samaĝuloj en la tuta mondo. Adreso: Esperanto-Grupo ĉe Zamenhof-liceo en PL-95-236 XO-D BODZ, str. Krucowskiego 4, Pollando. Ω

La oficiala regularo por la radioelsendoj de amatoroj en Austrijo difinas en sia paraĝrafo 12-a: „La tuta trafiko inter radio-amatoroj devas okazi en klara lingvo. La kutimaj internaciaj mallongigoj kaj signoj valoras kiel klara lingvo. Esperanto kaj la latina lingvo estas permesitaj.“ Ω

La Gastronomia Katedro de Kourbo organizas desegnaĵ-konkurson pri la temo „Esperanto: juna maniero por paroli kun la tuta mondo“. Informas: Esperanto-Katedro pri Gastronomio, Condominio Serena, I-47038 Santa-angelo di Romagna, Italujo. Ω

La 25-an de majo estis oficiale inaugurita Esperanto-sekcio de la Oficiala Biblioteko de Kortrejko. Ĝi nomiĝos „Esperanto-Fondaĵo C. Vanbiervliet“. Ĉeestis pluraj gravaj oficialuloj.Ω

Finiĝis la Esperanto-kursoj en la urboj Eupen, Welkenraedt kaj Dolhain. Kune sukcesis ĉirkaŭ 40 finstudentoj. Refoje varman gratulon al la profesorino, sinjorino Vertongen! Ω

„Fra dieci anni parleremo Euro-Atlantico?“ Efektive, naskiĝis nova planlingvo, la Euroatlantico. Kreinto: 71-jara itala jesuito. Ω

Dum 1975 la Pola Turisma Buroo „Juventur“ organizos konstantan busvojaĝon kun esperantlingvaj gvidantoj, tra Pollando, Ĉeĥoslovakio kaj Jugoslavio. La vojaĝoj estos ĉ. 4000 kilometroj longaj. Informas: „Juventur“, str. Jagiellońska 12, PL-085-67 Bydgoszcz. Ω

Pluraj jugoslaviaj knabinoj ĉ. 16-jaraĝaj deziras korespondi kun samaĝuloj el nia lando. Ĉe la redakcio haveblas iliaj adresoj kaj interesoj. Ω

Neniam forĵetu poŝtmarkon, eĉ se ĝi ŝajnas esti tute senvalora. Vi multe helpas al la Movado, se vi sendas viajn uzitajn poŝtmarkojn al UEA aŭ al la redakcio de „Sonorilo“. Ω

La venontaj UK-kongresurboj... 1975: Kopenhago, 1976: Rejkjaviko aŭ Liono, 1977: Varno ĉe Nigra Maro. Ω

Kiel pasintjare, la Antverpena Esperanto-Grupo denove organizos ĉivintre prelegociklon dum kvin sinsekvaj monatoj. Eminentaj personoj el la Esperanta Movado parolados pri ĝeneralaj temoj. Informiĝu ĉe Esperanto Sekretariaat, Drakenhoflaan 97, 2100 Deurne. Ω

```

+++++++
+ Lastminute ni ekscias pri +
+ la morto de sinjoro Hérion +
+ kiu jam delonge estis +
+ esperantisto kaj ankau +
+ prezidanto de la Verviersa +
+ grupo. Al sinjorino +
+ Hérion la komitato de BEF +
+ tutsincere kondolencas. +
+++++++

```

## libroj

Roberto Passos Nogueira: „Vojo kaj Vorto“, poemaro eldonita de Stafeto, 110 paĝoj.

Nia plej jun talento (li naskiĝis en 1949 en nordorienta Brazilo) apartenas al la moderna tendenco. Tio signifas, ke vi ne facile komprenos la plej multajn poemojn en tiu ĉi kolekto. Leginte kelkajn oni kontraŭe tre facile komprenas la latinan diron „Multa licet poetis... et stultis“ (multo estas permesita al la poetoj... kaj stultuloj). La plej kontraŭajn diraĵojn oni ĝis nun aŭdis de la „artistoj“ pri kio estas arto. De la unua ekstremo „tute apartaj estas arto kaj teĥniko“ ĝis tiu alia ekstremo „rapideganta aŭtomobilo estas pli bela ol la Nike de Samotrake“. Do nenio plu mirigu aŭ surprizu nin. Kio do estas poezio? „De la musique avant toute chose“? (antaŭ ĉio muziko)... aŭ nur vortoj? Au ĉu devas ĝin regi reguloj. Au, lau R.P. Nogueira „krei, per zorge elektita vortstrukturo, ian etoson ĉirkaŭ la poemo, etoson ne klare esprimeblan, el svagaj objektoj...“. Nu, lau tiu kriterio R.P. Nogueira mirinde sukcesis. La etoso estas plej „ne klare esprimebla“, kaj la objektoj ktp. estas efektive tre svagaj. Verŝajne vi nun pensas ke mi absolute kondamnas tiunĉi poemaron? Tamen ne: ĝi estas manifestiĝo de nia tempo kaj de nia (junula) homaro. Kaj kiel tia ĝi havas partojn lau mi vere artismajn. Tiu ĉi kolekto konsistas el originalaj kaj el tradukitaj poemoj. Kelkaj sugestas multe. Aliaj starigas

antaŭ ni bildojn de nia tempo kaj de nia homaro vere trafajn. Mi citas ekz. „La United Fruit Co.“ de Pablo Neruda Estas vere, ke tiuj modernuloj volas forĵeti ĉiujn regulojn, kvankam tio tutsimple ne eblas. Se unu sola ekkrio povas jam esti poemo, tiam ĉio estas poemo. Unu vorto povas efiki arte ĉar ĝi povas sugesti multe (mi prenukiel ekzemplon la vorton „perloj“) sed se ne estas poeto por malkovri al ni liajn pensojn kaj sentojn rilate tiujn perlojn, aŭ malkovri al ni lajn facetojn, tiam ni ne bezonas nek poetojn nek poemarojn. Se do tiu ĉi poemaro entenas ne multe kio restos kiel arta akiraĵo, ni fakte devas diri la saman pri niaj antaŭaj artistoj kiuj iĝis famaj nur pro kelkaj aranĝoj. Kiom da poemoj de Guido Gezelle estas tiel bele kaj? Tamen li apartenas al niaj plej grandaj. La sama tie ĉi. Konkludo: iom da belaĵoj, iom da strangaĵoj kaj iom da ekstravangaĵoj. En tio kuŝas mia rekomendo.

P. Korte, „Savo el la Neĝo“ - 77 paĝoj. Eldonis Dansk Esperanto-Forlag, Aabehøj, Danujo. Prezo: 9 Dan. Kron.

La verkinto de sukcesa lernolibro nun verkis romaneton, facile legeblan por komencantaj geknaboj. Mi kredas ke ankau en tio li sukcesis. Ĝi estas sufiĉe atentokapta. Nekutime estas ke ĉiu paĝo estas je unu flanko presita kaj je la alia flanko ne presita, tiel ke la leganto -

se li volas - povas skribi notojn. Tial mi opinias, ke povus esti iom pli da vortoj en la tekstoj (kiujn la leganto devus serĉi en vortaro, kaj noti). Tio evidente ankau plimalfaciligus la taskon de verkinto. Pro sama kaŭzo la desegnaĵoj eble povus montri ciferojn, kun la Esperanto-vorto de la figuroj sur la nepresita paĝo.

Simone Glodeau: „Une Humanité, une Langue“, 48 paĝoj. Eldonis SAT-Amikaro en Parizo. Prezo: 3 FF.

Jen bona propaganda broŝuro franclingva. Krom la informaj artikoloj, enestas ankau iom da biografio pri D-ro Zamenhof, iom pri la strukturo de nia lingvo kaj iom pri la historio de la mondlingvaj projektoj. Ĝi do anstataŭas la pli ampleksan sed delonge ne plu haveblan libreton de Rollet de L'Isle „Initiation à l'Esperanto“. Parolante pri la forteco de la angla lingvo, la autorino mencias ankau la kontraŭstaron kontraŭ la angla. Tamen, lau mia opinio, tiu problemo ne estas sufiĉe profunde pritraktita. Ĝija estas nunmomente la problemo por la prosperigo de Esperanto.

(Ĉiujn recenzojn verkis Fern. Roose.)

AAAAAAAAAAAAAAAAAAAAAAAAAAAAAAAA

Amiko estas tiu, kiu konas ĉiujn viajn malbonajn flankojn, kaj tamen amas vin.

Krome ĵus aperis...

Anni kaj Montmartre (1930) R. Schwarz (1894-1973). 126p. 20 cm. Broŝ. 122fr. Fotorepresaĵo 1974 de tre ŝatata originala romano.

Ĉu vi deziras korespondi? (fotorepreso 1974), M. Noll, 16 p. 14cm. Broŝ. 17fr. Konsiloj por korespondemuloj kun utilaj esprimoj kaj frazoj.

Dek kvin komedietoj (1974) R. McKay. 82p. 20cm. Broŝ. 63 fr. Kolekto de facile prezentebaj komedietoj por kursfino, klub-vespero ktp.

Konsideroj (1974) J. Haazen. 27 p. 27cm. Broŝ. Stencil. 50fr. Publika letero pri organizokaj perspektivoj de la Esperanto-movado.

Kvindek jaroj de Esperanto en Oomoto (1973) E. Ito, N. Esumi kaj T. Nakamura. 90p. 21cm. 90 fr. Broŝ. Laujara kroniko de la ligoj de Oomoto kun Esperanto.

Roseroj (1974) R. van Dalsem - 47p. 20cm. Broŝ. 81fr. 12 novaj kantoj kun akompano.

La Sepa Nokto (1968) L. Mĥaĉko. El la nederlanda tradukis A. Kooij-Van Holst (1974). 131 p. 30 cm. Ringe broŝ. 99 fr. Memoroj el sep tagnoktoj en Prago dum la "Praga Printempo" de 1968.

La Vojo al Nirvano au la Dhammapado El la palia trad. T.T. Anuruddha (1973). 94 p. 20 cm. broŝ. 41 fr. Klasika teksto de Budhismo, kun enkonduko kaj notoj.

Wereldtaal gezocht (1974) 24p. 21cm. Broŝ. 20 fr. Nederlandlingva informa broŝuro pri E. Enhavas kvar verkaĵojn.

## kulturo

### VERDA LUMO POR LA UNO-UNIVERSITATO

Dum la venonta somero, la ĝenerala sekretario de Uno, D-ro Kurt Waldheim, nomos el listo de tri ĝis kvin kandidatoj, la rektoron de la „Universitato de la Unuiĝintaj Nacioj”, kiu en oktobro komencos sian scian taskon. La ĉefparto de la Universitato estos en Tokio. Tiu ĉi nova altlernejo tamen ne aljuĝos akademian gradon, sed sin dediĉos nur al scienca laboro. La projekto datumas de septembro 1969 sub la tiama ĝenerala sekretario U-Thant. Por la realigo de tiu ĉi projekto ankau Unesco ludos gravan rolon.

La Uno-Universitato ja havos sian stabejon en Tokio, sed starigos institutojn en multaj landoj de la mondo. Ĝi donos al finstudintoj de altlernejoj la eblecon por plua scienca laboro. Oni ellaboris ian kvinjaran planon kiu antaŭvidas, ke en oktobro la Uno-Universitato startos malgrandskale kaj poste disvastiĝos ĝis la planita fina fazo. La kompleta financado estos certigita de libervolaj kontribuoj de diversaj registaroj kaj ankau de ne-oficialaj instancoj. Japanujo jam faris la unuan paŝon donante sumon de + 100 milionoj da dolaroj.

Lau la teksto de sia ĉarto, la Uno-Universitato iĝos internacia komunumo de sciencistoj. La tasko estos ankau la disvastigo de sciencaj informoj tra la tuta mondo. Oni ankau pripensas sistemon de „gastprofesor-

oj”, kiuj havos sian lokon en sia propra hejma universitato, sed dum certaj periodoj instruus en la Uno-Universitato.

(el „Unesco Informatie”)

Por vere esti fakulo en iu direkto, oni devas esti en multaj aliaj direktoj kompleta idioto

(Dick Hillenius)

### Kiuj bremsas la veran renovigon?

„Estas du specoj de homoj kiuj baras la progreson. La unuaj estas la obstinaj konservemuloj.

Kun iliaj ideoj kiuj detiriĝis de la socia realeco, ili ne povas esti gvidantoj de la kapo de la komuna ĉaro: ili povas nur fuŝe mallerti malantaŭ la grupo kaj protesteti ke oni tro rapidas. Ili provas reteni la ĉaron, kaj retroveturigi ĝin.

Ni ankau estas kontraŭ la frazararo de la dekstraj ekstremuloj: iliaj ideoj antaŭiras certan disvastigistadion de la objektiva proceso: kelkaj inter tiuj konsideras sian fantazion realaĵo; aliaj penas por realigi momente idealon kiu nur estonte povas realiĝi; ili sin izoladas de la praktiko de la plimulto de la homoj kaj de la realeco de la momento, kaj lau siaj agoj aspektas kiel aventuristoj.”

Mau Ze-Dong

## aktualajcoj

### LA TAGO DE LA ESPERANTO-FILMO

Ni havas la plezuron inviti vin partopreni en la TAGO DE LA ESPERANTO-FILMO kiu okazos en Bruselo, sabaton la 7-an de septembro 1974.

La tago konsistos el du partoj:

- 1) Autobusa ekskurso (sekvata de privataj automobiloj) al Waterloo kaj ĉirkaŭaĵo. Tiu ĉi ekskurso kostas 120 fr. Tiu ĉi sumo tamen ne estas pagenda de tiuj kiuj sekvas per privata automobilo nek de tiuj kiuj venas per speciala autobuso el sia hejma urbo. La ekskurso iras i.a. lau la jenaj lokoj: Botanika ĝardeno, Katedralo de Laken, Reĝa Palaco, Ĉina Palaco, lau la Atomium, Abatejo de Terkameren/La Cambre, kastelo de Groenendaal, Arbarego de Zoniën/Soignes, Waterloo.
- 2) Projekcio de filmoj en Esperanto en la Reĝa Biblioteko, kun samtempa libroekspozicio.

La celoj de la Tago - kiun organizis la ĉefaj Esperanto-organizaĵoj de Belgio (neutrala, fervojista kaj laborista) estas distraj, kulturaj kaj propagandaj, nome:

- kunvenigi kaj interkonigi ĉiujn agantojn por la internacia lingvo kaj iliajn geamikojn;
- montri la praktikan aplikadon de Esperanto en la moderna kinaro;
- krei kondiĉojn de vasta tutlanda informado pri nia afero.

Por plenumi tiun ĉi lastan celon, la Organiza Komitato kunvokis ĉiujn gazetojn, la radion kaj la televidon (ambaulingvaj) al Gazetara Konferenco en la nova, luksa Domo de la Gazetaro en Bruselo, la 6-an de septembro. Inter aliaj parolos reprezentanto de la dana ambasado, s-ro E. Svane.

Krome okazos speciala televidelsendo sur la nederlandlingva ĉeno verŝajne jaŭdon la 12-an de septembro pri Esperanto.

Ni do renkontiĝos venontan sabaton !

MET WELKERENDE  
MAGAZIJN VOOR MODERNE HERENKLEDING

**in't duifken**

GROTE KEUS  
IN GEREDE KLEDING.

KOSTUMEN - SPORTJASSEN - BROEKEN  
UNIFORMEN - CASARDIJNEN - JODERS  
STELVOOL MAATWERK

KOEIPOORTSTRAAT 64-66, ANTWERPEN

RABATO POR ESPERANTISTOJ

Por ĉiuj viaj asekuroj kaj reasekuroj

unu adreso :

**J. VERDYCK & Co** P.V.B.A.

**ANTWERPEN, Lange Nieuwstr. 30**

Telef. 03/320902 - Telekso 32283 - Telegr. "Dyckassur"

Agentejo en Nederlando:

ROTTERDAM, Korte Hoogstraat 9

Telefono 1142 19 - Telekso 23243 - Telegr. "Pemwem"

Reprezentita en Londono kaj ĉe "Lloyd's of London".

Korespondantoj en la tuta mondo

Unuaklasa servo

Kompetentaj fakuloj

**KORESPONDO EN ESPERANTO**

**FIRMA VAN ISEGHEM  
& VERSTRAETEN**

P. V. B. A.

St.-Bernardse steenweg 631  
Hoboken

Vitraloj - Speguloj -

„securit“ vitro

kolorigitaj vitroj

aluminiaj senmastikaj

stangoj por kupoloj

Vitro-cementoĵoj por

tutvitra-konstruaĵoj

mastiko

**Telefono 272875**